

La studjaroj de Ernest Naville

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-789, 1978 novembro 23, 25

Cl.- Salutas el Svislando gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Dum kelkaj radio-prelegoj ni interesiĝos pri la vivo kaj penso de la ĝeneva filozofo Ernest Naville, kies nomo estis donita al unu el la domoj de Gastejo Edmond Privat. Li estis la unua honora prezidanto de Svisa Esperanto-Societo.

A.- Ernest Naville havis la privilegion vivi dum preskaŭ tuta jarcento. Naskiĝinta en 1816 li mortis en 1909, 94-jaraĝa. Lia infaneco, kiel vi jam aŭdis, disvolviĝis en la vilaĝo Vernier, kie lia patro François Naville gvidadis modelan lernejon.

Cl.- Ernest Naville frekventis la kursojn en la Instituto de sia patro ĝis la jaro 1933. Tiam 17-jaraĝa li komencis iri al Ĝenevo por sekvi la gimnaziajn kursojn en la Akademio. Ĉiutage li marŝadis dufoje unu horon por iri de Vernier al Ĝenevo kaj de Ĝenevo al Vernier. Li ŝatis tiujn piediradojn, kiuj donis al li la tempon mediti pri la lernitaĵoj kaj observi la naturon. Li tagmanĝis ĉe amiko de lia patro, pastoro Edouard Diodati, kiu tiam oficis kiel urba bibliotekisto.

A.- Tiam Ĝenevo ankoraŭ estis urbeto kun nur 30.000 loĝantoj, kiun ĉirkaŭis fortika muro. Nur tri pordoj permesis la en- kaj el-irojn. Kaj ili fermiĝis vespere je la deka horo. Nur je la sunleviĝo oni povis reeniri la urbon.

Cl.- Ernest Naville tuj aliĝis al la studenta societo Zofingen, kies centra prezidanto li fariĝis jam post unu jaro. En la kadro de tiu studenta societo Ernest Naville havis la okazon prezenti siajn unuajn paroladojn. Li tuj montriĝis talenta oratoro. Inter liaj prelegoj ni menciu studon pri la akademia instruado, ĉar ĝi jam difinas la sintenon, kiu karakterizos la tutan vivon de la ĝeneva filozofo.

A.- En tiu studo Ernest Naville bedaŭras la multiĝon de la kursoj. La kresko de la instrufakoj malfavoras la meditadojn, kaj nur meditado kondukas al racia vivfilozofio. Ernest Naville konstatas la kreskantan gravecon de la natur-sciencoj. Li avertas, ke scienca serĉado, kiu ne estas direktata de racia filozofio reprezentas por la estonteco grandan danĝeron. La liberecoj civilaj kaj religiaj povas esti neniigitaj de la materialismo kaj protekto kontraŭ tiu danĝero devas esti serĉata en la kristanismo.

Cl.- En tiu studenta societo Zofingen Ernest Naville havis la okazon amikiĝi kun multaj junuloj, kiuj poste ludis gravan rolon en la svisa vivo kultura, politika, scienca aŭ religia.

A.- Ernest Naville abiturientiĝis en julio 1835. Li estis tiam 19-jaraĝa. Tuj li forveturis al Parizo, kie li reatadis dum la tuta somero ĉe onklo. En lia tagĵurnalo oni legas, ke li ĉeestis pli ol 25 teatrajn spektaklojn, ke li frekventis kursojn en la universitato Sorbonne, ke li iris aŭskulti protestantaj kaj katolikajn predikistojn kaj vizitis sciencistojn, inter ili la faman Ampère.

Cl.- En la teatro okazis tiam bataloj inter la adeptoj de la klasikismo kaj tiuj de la romantikismo. Ernest Naville estis tro konservativa por povi kompreni la celadon de la romantikismo, kies ĉefa gvidanto estis Victo Hugo.

A.- En septembro 1835 Ernest Naville revenis hejmen por daŭrigi siajn studojn. Li eniris la teologian fakultaton. En majo 1839 li prezentis tezon pri la temo **Sacerdoteco en la kristana eklezio**. Vasta aŭdantaro ĉeestis lian finstudan paroladon. Tio pruvas, ke la familio Naville havis multajn admirantojn. Sed ni ne forgesu, ke la oratora talento de Ernest Naville jam altiris multajn geaŭdantojn. Tiu tezo aperis sub formo de 116-paĝa broŝuro. En ĝi Ernest Naville demonstras, ke se la kristanoj estus fidelaj al la kredo, kiun ili proklamas, ili ne bezonus gvidantojn. Sed ĉar la pastroj estas necesaj, li difinas al ili konduktilinon. Estas verko de moralisto.

Cl.- Estis la monato majo 1839. Fininte siajn studojn kaj ricevinte inviton labori en franclingva protestanta lernejo en la itala urbo Firenca, Ernest Naville foriris piede al tiu urbo pasante tra Sudfrancio. En Firenca li devis deĵori nur matene, kio lasis al li multajn eblecojn viziti la regionon, la artaĵojn kaj la familiojn, kiuj lin invitis. Li finis sian restadon en Italio per piedmigrado ĝis Roma kaj Napoli. Li vizitis multajn katolikajn predikistojn kaj revenis Ĝenevon en aŭtuno 1840.

A.- Lia patro François Naville esperis povi transdoni al sia filo Ernest la gvidadon de sia modela lernejo. Sed la 5-an de novembro 1840 Ernest Naville edziĝis kun Albertine Picot, kiu estas 24 jaraĝa. Tiu juna paro ne serĉis hejmon, ilia geedza vivo disvolviĝis en la patra hejmo de la juna edzino. Komenciĝis por Ernest Naville finance senzorga vivo, kiu permesis al li sin komplete dediĉi al beletra kaj pedagogia kariero.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando pri la juneco de la ĝeneva filozofo Ernest Naville, la unua honora prezidanto de Svisa Esperanto-Societo. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!